Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 1an de novembro 2012, per Skype.

(Protokolo aprobita la 23an de novembro 2012.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Asbjørn Lindh en Oslo
Ulf Chr. Lunde en Os (prezidis)
Ingebjørg Rambjør en Bergen
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 27an de septembro 2012
La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio
Kasisto Anne Karin Bondhus raportis pri la Skagen-kontoj:
Skagen vekst: 32 137 kr
Skagen høyrente: 62 166 kr

3. Seminario
Ni planas seminarion la 2an de februaro 2013. Mario Machlik jam kontaktis Kristoffer Haug kaj Douglas Draper por emandi ĉu ili povos fari prelegojn dum la seminario. Mario plulaboros pri la planado kaj celas prezenti la programon en la venonta Norvega Esperantisto.

4. Strategia plano
Asbjørn Lindh prezentis siajn pensojn pri la plano, kaj la estraro diskutis. Asbjørn plulaboros kaj prezentos sian proponon por nova plano dum la venonta estrarkunveno.

5. Eventualaĵoj

a) **Lernolibro**
Anne Karin Bondhus raportis ke la lernolibro *Esperanto – la rekta metodo* (Esperanto – den direkte metoden) nun estas presita (200 ekzempleroj), kaj estas survoje poŝte kaj al ŝi kaj al Bjørn Kristiansen Øyen. La libro kostos kr 50 aldone al sendokostoj. Oni kontaktu Anne Karin aŭ Bjørn por mendi la libron.

b) Språkåret 2013 (La Jaro de Lingvoj 2013)
Anne Karin Bondhus kontaktis la projektestron de la Jaro de Lingvoj, kiu ne havis pretajn, konkretajn ideojn pri aranĝoj kie NEL povos partopreni. La estraro diskutis kiel Esperanto povos esti menciita en la planoj/programo: Ĉu taŭgus ekz. nia Landa Kongreso? Mario Machlik kontaktos denove Språkåret kaj prezentos niajn pensojn kaj demandojn.

La interkonsiliĝo daŭris 19:33–21:02.
La venonta interkonsiliĝo okazos vendredon la 23an de novembro 2012.
Raportis Ingebjørg Rambjør.